

Johann Wolfgang von Goethe,
Egalaĵo (Noktokanto de
migranto)

tradukita de Manfredo Ratislavo

Super ĉio iĝas
Kviet',
Kaj ne moviĝas
Pro ventet'
Iu foli';
Silentas la birdoj ĉirkaŭe.
Atendu – baldaŭe
Ripozos vi.

...

Johann Wolfgang von Goethe,
Same

tradukita de Pejno Simono

Super montopintoj –
silent',
tra pinopingo
la senvent'
spiras sen fort';
arbare la birdoj ekmutas.
Pretu, aludas
silento pri mort'.

...

Johann Wolfgang von Goethe,
Same tiel

tradukita de Richard Schulz

Super ĉiuj montoj
Trankvil',
Kaj ĉiuj fontoj
Sen babil';
Aŭdas vi ne
Birdetan ĉirpon arbare.
Pensu prepare
Pri la pere'!

...

Johann Wolfgang von Goethe,
Super montoj regas
kviet'

tradukita de Poul Thorsen

Super montoj
regas kviet',
tra l' foliaro
nur ventet'
spiras kun trem'.
Birdoj arbare silentas,
se vi atendas,
pacas vi mem.

...

Traduko de la Germana poemo “*Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)*” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (*Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, *1938-11-04*) en 1983-01.

MR-03-4 / Arg-356-707 (2006-03-20 14:44:12)

Traduko de la Germana poemo “*Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)*” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de PEJNO SIMONO (*Simon Edward Adrian Payne, *1941-12-23*).

Arg-356-1974 (2014-03-14 14:12:56)

Tiu ĉi poem-traduko troviĝas en <http://eo.wikipedia.org/wiki/Goethe>.

Traduko de la Germana poemo “*Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)*” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de RICHARD SCHULZ (*Rikardo Ŝulco, *1906-07-12 – †1997-09-26*).

Arg-356-706 (2013-02-26 15:16:30)

Tiu Esperantigo aperis komence de la okdekaj jaroj de la 20a jarcento en la “*Vestfaliaj Flugfolioj*”, kiujn eldonis Rikardo Ŝulco (*Richard Schulz*), honora membro de Germana Esperanto-Asocio. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz. Pri Richard Schulz vidu la vikipedian retejon http://de.wikipedia.org/wiki/Richard_Schulz.

Traduko de la Germana poemo “*Ein Gleiches (Wanderers Nachtlied)*” de JOHANN WOLFGANG VON GOETHE (*1749-08-28 – †1832-03-22) en Esperanton de POUL THORSEN (*1915-01-07 – †2006-01-30).

Arg-356-708 (2010-05-28 21:34:24)

Poul Thorsen estis dana Esperantista poeto, kiu verkis multajn originalajn kaj tradukitajn poeziaĵojn en la Internacia Lingvo. Vidu ankaŭ: <http://www.poulthorsen.dk/> kaj <http://www.liberafolio.org/2006/forpasis-poul-thorsen/view>.